

RAPORTO DE LA KOMISIITO PRI VIDBENDA KURSO
AL LA 55A KONGRESO DE ELNA EN TIJUANA, MEKSIKIO, 27-30 JULIO 2007

Fakte mia laboro ĉi tie temas nur pri la DVD kurso, "Esperanto, Pasporto al la tuat mondo." Ĉi tiu jaro estis tre frustrige ĉar la ĉefa respondeculo por finenmeti mankantajn subtitolojn suferas grandan familian problemon kaj nur sukcesis enmeti la Japanajn subtitolojn. La kurso bonege vendiĝis en Japanio kaj daŭre sufiĉe bone vendiĝas en Usono, kaj ELNA decidis listigi ĝin inter la varoj de sia libroservo. Ĝi nun kostas iom malpli por aĉetantoj, sed ne plu estas "donaco" al ELNA. Nia hejmo estas la "fabrikejo" de la kompletoj kaj vendas ilin al ELNA kontraŭ la kosto de materialoj.

Dum la kongreso en Florenco, mi subskribis kontrakton kun ITV (Ĝangalo) por reklami kaj produkti la kurson en Brazilo - kontraŭ nur 10 Eura makleraĵo por ELNA. "Ĝangalo" estis la unua organizo kiu elsendfluis ("streamed") ĝin. Estas interesa metodo, sed mi dubas ke ĝi estas ~~ion~~ pli bona ol simpla reklamo. Studentoj devas havi la ekzercojn kaj eĉ plej bone ankaŭ instruiston kiu povas iom gvidi kaj/aŭ respondi al demandoj. Bedaŭrinde, ITV bankrotis kaj mi ne scias kiom da personoj en Brazilo fakte aĉetis la kurson de ITV antaŭ la bankrotiĝo.

La loka 2-jara kolegio (Peralta College) en Oakland ankaŭ elsendfluis ĉiun lecionon 3 foje semajne dum 2 semestroj per sia televida stacio. Tamen, la kanalo ne inkluzivis sufiĉe da informo por direkti la aŭskultantojn al ELNA por aĉeti aŭ lerni kiel pli bone studi per ĝi. Tiu sperto pravas, laŭ mi, ke devas esti pli rekta ligo kun la kolegioj kaj Esperanta respondeculo por gvidi la studadon. Espereble ĉi jaro - kiam ni finos la kurson, mi provos fari tion en Oakland-Berkeley regiono. Se eble, mi sukcesos kun Peralta-Kolegioj kaj povos helpi aliajn grupojn fari same estontece.

Vendado de la kurso stagnas en Eŭropo kaj ekster Japanio - kiun mi esperas solvi tre baldaŭ. Steve Wagenseller (nia kara "Difektito") iris al Eŭropo por instrui en Grezillon, kaj ankaŭ iris al Diana Weickert por helpi ŝin pli facile enmeti mankantajn subtitolojn. Laŭ lastatempa raporto, Rusa (tradukita de Boris Kolker estas farita ĝis leciono 8), Rumana estis enmetita (nekontrolita), Hungara preskaŭ finita, Ĉina finita sed ne kontrolita, Persa preskaŭ finita, kaj Korea komencita. Mi havas esperon ke ni povas fini ilin ĉijare kaj enkonduki la finan version ĉe la 93a Universala Kongreso en Rotterdamo, 2008.

Ni nun havas en la DVDoj subtitolojn por la vortoj de la instruisto en ok lingvoj: angla, franca, germana, hispana, itala, japana, malta, portugala - kaj ĉiu vortoj de Esperanto en la unuaj du lecionoj. La kialo por la Esperanta estas nur por instrui kiel aspektas la alfabeton. Alie, la subtitoloj en Esperanto tute ne necesas.

Kiam ni preparos la vitran mastron (glass master), ni devas ankaŭ havi: Kontrolitajn ĉinan, hungaran, korean, persan, rumanan, kaj rusan - entute 15 lingvojn. Dio helpu nin! Mi opinias ke ni sukcesos kaj tiam povos aperigi grandan reklamon pri la plej ampleksa kaj profesia instruilo por fremda lingvo en la mondo! Eĉ nun ĝi estas la plej ampleksa - sed ne ĝis nun vendebla ĉirkaŭmonde.

Lusi Harmon
Komisiito por Esperanto, Pasporto al la tuta mondo
Julio, 2007